Suplemento al LEA/G-INFORMILO n-ro 14

**VOĈDONILO**

**REFERENDUMO 1987**

sendota al LIBERA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto Eduard Weichmann,
Lotenkamp 4, 4600 Dortmund 14

La 24 partoprenantoj de la LEA/G-ĉefkunveno, kiu okazis la 28-an de aŭgusto 1987 en la kadro de la 60-a Kongreso de SAT en Bulonjo ĉe maro, decidis ke la tie elektita estraro de LEA/G ankaŭ estu voĉdonita per referendumo de tiuj gekamaradoj, kiuj ne ĉeestis la ĉijaran ĉefkunvenon.

**Temas pri la jenaj proponitaj gekamaradoj:**

| | |
|---|---|
| 1-a prezidanto: | Albert Stephan, Düsseldorf |
| 2-a prezidanto: | K-Heinz Kersting, Essen |
| Kasistino: | Margot Weichmann, Dortmund |
| Redaktanto : | Eduard Weichmann, Dortmund |
| Protokolanto : | kaj redaktora kunlaboranto Alfred Conzeth, Mettmann |
| Konsilantoj : | Liesel Nagel, Freiburg |
| | Josef Weidacher, München |
| | Holger Raabe, Kiel |
| | Manfred Führer, Frankfurt/M |
| Revizoroj : | Günter kaj Adele Bartz, Dortmund |

ĉi tie detranĉu

**Bonvolu signi vian voĉdonon per kruco aŭ rimarko**

JES ☐ mi entute akceptas la kandidataron!

NE ☐ mi ne bloke akceptas la kandidatojn!

NE ☐ mi ne akceptas la jenajn kandidatojn .......

..............................................

☐ mi detenas en voĉdono!

RIMARKO : Ne resendita Voĉdonilo-Referendumo estos pritraktata kiel JESO al la kandidatoj.

Laŭ demokrata maniero vi rajtas resendi la voĉdonilon sen nomo kaj adreso.

Anticipan dankon!

# LEA-INFORMILO

OFICIALA ORGANO DE LA
LIBERA ESPERANTO-ASOCIO
EN GERMANLINGVIO
APERAS NEREGULE

Numero 14 (NOVA SERIO) ELDONITA DECEMBRO 1987



"LA ... TA HOMARO DEFENDU LA TUTMONDAN P... ON
KAJ KONTRAŬSTARU AL ARMIGO DE LA KOSMO"

FELIĈAN NOVAN JARON AL ĈIUJ GEKAMARADOJ KAJ LEGANTOJ DE LA LEA/G-INFORMILO DERIRAS LA malsupre prezentita nova LEA/G-estraro, kiun elektis la partoprenintoj de la LEA/G-ĉefkunveno en Bulonjo ĉe Maro , kiu oficiale ekfunkciados tuj post la perreferenduma voĉdono fare de la LEA/G - membraro.

1-a prezidanto:
Albert F. Stephan
Carmenstr. 5
4000 Düsseldorf 11
Tel.: 0211-574363

2-a prezidanto:
Karl-Heinz Kersting
Bredowstr. 3
4300 Essen 1
Tel.: 0201_271446

Kasisto:
Margot Weichmann
Lotenkamp 4
4600 Dortmund 14
Tel.: o231-89777
Postgiro-Kto.:
Dortmund 129128-467

Redaktoro:
Eduard Weichmann

Protokolisto kaj redaktora kunlaboranto:
Alfred Conzeth
Moselstr. 22
4020 Mettmann

Pri la komplete proponitaj estraranoj vi povas legi en la ĉefkunvena raporto sur paĝo 3

LA ANSTATAŬIGITAJ GEESTRARANOJ kamarade dankas pro la parte bonegaj interrilatoj kun la gekamaradaro kaj ili promesis laŭpove kunagi favore al LEA/G.

Ankaŭ la nova LEA/G-estraro sincere dankas al la iamaj funkciuloj kiuj pro kelkdiversaj kialoj sin sentis devigataj ĉesi la estraran laboron.

La LIBRO-SERVO de LEA/G ankoraŭ nun funkcias laŭ la konata adreso:
Manfred Führer, Renneroder Str. 22
6230 Frankfurt am Main - 80

Karaj legantoj, bonvolu noti, ke k-do M.Führer ĝis komence de februaro 1988 feriadas ekstere de Eŭropo.

La frontpaĝa grafikaĵo —prezentita en la germanlingva broŝuro "Sovjetunion heute" — alegorie esprimiĝas la necesan devon de ĉiuj surteraj naciecoj respondece k racie ŝirmi nian terglobon kontraŭ milito.






# PROTOKOLO

## LEA/G-ĈEFKUNVENO 1987

Multon oni povas diri pri la 60-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu okazis inter la 22-a kaj la 29-a de Aŭgusto 1987 en la histori-riĉa urbo Bulonjo-ĉe-Maro — en kies muroj jam antaŭ 82 jaroj la memorinda Kongreso de la nuna U.E.A. (Universala Esperanto-Asocio) havis sian lokon.

Do - en la CENTJARIĜO de Esperanto ankaŭ la laborist-tendenca organizo SAT aldonis sian kontribuaĵon al la mondskala manifestacio de la Internacia Lingvo (ILo). Sufiĉe da naci- kaj Esperanto-lingvaj gazetoj favore raportis pri ĉi tiu evento kaj tiamaniere akcentis la sukceson de la Kongreso, kiu sendubé kontentigis ĉiun kongres-partoprenanton pro sia multflanka programo — kultura, distra, amuza kaj labor-riĉa.

Kvarcent partoprenantoj el 21 landoj serioze okupiĝis pri gravaj kaj aktualaj temoj kaj la kongresanaro bone harmoniis, kvazaŭ ĝi estus granda familio, pri kiu profesoro H.Frank (Prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino) al mi mire laŭdis la tre altan nivelon, en kiu ili aplikas la ILon Esperanto.

Ni povas esti kontentaj, ke LEA/G sukcesis okazigi sian ĉefkunvenon en ĉitiu impona kadro, la 28-an de aŭgusto 1987. Ĉitiu kunveno okazis laŭ estrara invito, pri kio komunikis LEA/G-INFORMILO n-ro 13.

Ankaŭ en la unua kongresa laborkunsido k-do E.Weichmann oficiale varbis por tiu aranĝo kaj informis pri tempo kaj loko de la kunveno.

Malgraŭ aliaj allogindaj programeroj kiuj samtempe okazis, 24 gekamaradoj sekvis nian inviton. Sed bedaŭrinde la al ni disponigita labortempo de du horoj vere ne sufiĉis profunde solvi nian tagordon. Do, ni estis devigitaj tro rapide tuŝi almenaŭ la plej gravajn temojn.

daŭr. p.4

(daŭr.) K-do Weichmann, anstataŭigante la 1-an prezidanton, k-do M.Führer, malfermis la kunvenon kaj salutis la geĉeestantojn nome de la estraro.

Post la enkondukaj vortoj de k-do Weichmann pri la nuna stato de LEA/G oni elektis k-don J.Weidacher el Munkeno kiel gvidanton de la ĉefkunveno, kiun li perfekte solvis.

La akceptita tagordo enhavis la jenajn punktojn:
- *) raporto de la estraranoj
- *) proponoj pri elekto de kandidatoj por nova estraro
- *) baloto de la proponitaj estraranoj
- *) diversaĵoj.

K-do Weichmann laŭtlegis leteran raporton de k-do Führer per kiu li ankaŭ deklaris sian decidon ne plu kandidati al la prezidanteco.

Laŭ la legita raporto de la kasistino la membra cifero konstante malkreskas pro manko de novaliĝantoj kaj nun nombras 81 gekamaradojn. La financa situacio de LEA estas kontentiga dank' al la kotizpag- kaj donacemo de la fidelaj gekamaradoj.

K-do A.Stephan, (peranto de SAT en la FRG) raportis, ke la SAT-anaro en Germanio ciferas 115 personojn, el kiuj la duono samtempe aktivas en LEA/G.

La redaktoro povis diri ke ĉijare eldoniĝis tri numeroj de nia Informilo, menciante, ke ekzemple unu eldono de la Informilo kostas ĉ. GM 250,- (inkluzive la presado, preparado, ekspedado kaj apudaj kostoj.) Parton de la eldonkvanto ni utiligas propagand- kaj interŝanĝcele.

Post la diskuto de la raportoj ni venis al la tagorda punkto:
"Proponoj pri elekto de kandidatoj al la estraro"

Estas konate, ke la transpreno de organizaj postenoj, kiuj de la funkciuloj postuladas multe da energio kaj libertempo. Krom tio ni ne forgesu la malfacilaĵojn kiuj daŭre akompanas la funkciadon.

Finfine la ĉeestantaro proponis kaj elektis sen kontraŭvoĉo la jenajn gekamaradojn al la estraro:

(vidu p. 5)



| | |
|---|---|
| 1-a prezidanto: | Albert Stephan, 4000 Düsseldorf 11 |
| 2-a prezidanto: | K-Heinz Kersting, 4300 Essen 1 |
| Kasisto : | Margot Weichmann, Dortmund 14 |
| Redaktoro : | Eduard Weichmann |
| Protokolanto : | kaj redaktora kunlaboranto: Alfred Conzeth, 4020 Mettmann |
| Konsilantoj : | Liesel Nagel, 7800 Freiburg<br>Josef Weidacher, 8000 München<br>Holger Raabe, 2300 Kiel 1<br>Manfred Führer, 6230 Frankfurt/M 80 |
| Revizoroj : | Günther kaj Adele Bartz, Dortmund |

Rimarko al la tasko de la konsilanto: La estraro proponas, ke ĉiu konsilanto ankaŭ funkciu kiel kontaktadreso inter la gek-doj loĝantaj en la sama landa distrikto.

Rimarko pri la baloto de la estraro: La ĉeestantoj,kiuj unuanime bloke voĉdonis al la estraro,proponis, ke LEA aranĝu referendumon por ke ĉiu membro havu la eblecon demokrate kundecidi rilate al la baloto.

Antaŭ ol finiĝis la ĉefkunveno estiĝis vigla diskutado pri internaj temoj. K-do Roland Schnell kvazaŭ provoke tuŝis la demandon, ĉu necesas, ke la postmilita LEA/G (kompare al LEA/G antaŭ la faŝisma epoko) havu ekzistadrajton. Juna k-do Th.Pusch, deziris informiĝi pri senco kaj celo de nia organizeto. Pro la limigita tempo ne eblis findiskuti pri la demandoj, sed k-do F. Bues, Hannover, telegramstile skizis la postmilitan evoluon de la komuna esperanto-movado en Germanio kaj ne forgesis mencii la kontraŭstatutan agadon de la tiama komuna estraro, kiu kaŭzis la refondon de LEA/G sub la nomo: LIBERA ESPERANTO-ASOCIO, al kiu en la jaro 1955 aliĝis ĉirkaŭ 450 gesampensuloj. K-do Bues tiatempe estis juna aktiva kunaganto.

En speciala kunsido la nova estraro dediĉis sian atenton al la temo pri kotizpago al LEA kaj venis al la konkludo, ke la kotizo al LEA ankaŭ por la jaro 1988 restu tiel malalta kiel en la pasintaj jaroj.

:: JE VIA DISPONO TROVIĜAS PAGILO EN ĈITIU INFORMILO ::

======== LISTO DE KOTIZOJ KAJ ABONO POR LA JARO 1988 =

| | GM | | GM |
|---|---|---|---|
| Plena kotizo ... | 12,-- | por geedza paro | 18,-- |
| Emeritito ..... | 10,-- | por geedza paro | 12,-- |
| Senlaborulo .... | 10,-- | por geedza paro | 12,-- |
| gestudentoj .... | 6,-- | geinfanoj ..... | 5,-- |
| | | jara abono al la Informilo ..... | 6,-- |

La kotizpago inkluzivas senkoste ricevi la INFORMILON

=====================================================

## RAPORTO PRI LA LEA-KOMITATO DE S A T.

La estraro de la LEA-komitato konsistis dum la lastpasintaj joroj el: Fr.Maitland (SATEB), prez.Guy Cavallier (SAT-Amikaro), vicprez.:Yngve Nilsson (SLEA). Maitland per letero sciigis ke li ne plu povas estis komitatano pro malbona sanstato.

La komitato kunvenis du fojojn dum la SAT-kongreso 1987. Kiel prezidanto funkciis Roland Grandiere. Partoprenis la kunvenojn reprezentantoj de LEA-oj en Britio, Danio Francio, Germanio, Nederlando, Svedio k reprezentantoj de la P.K. de SAT. K-do Weichmann reprezentis LEA/G.

La reprezentantoj donis raportojn pri la agadoj kaj aktualaj statoj de la LEA-oj.

Estis traktataj la rilatoj inter la LEA-oj kaj pri interŝanĝo de la organoj kaj aliaj presaĵoj, kiujn produktas la LEA-oj. La komitato admonas la LEA-ojn sendi al "s-ulo" raportojn pri siaj agadoj. Korespondservo LEA-SAT. Henri Masson prezentis provaĵon por tia servo.

Kion la LEA-oj povas fari en landoj, en kiuj ne ekzistas LEA-oj, precipe en la Tria Mondo? Ekestis diskutado pri tiu demando.

Post esploroj kaj traktoj pri nova prezidanto de la komitato, Guy Cavllier, SAT-Amikaro, akceptis la postenon.

Prezidanto de la LEA-komitato:

Gay Cavallier
3 rue de Nancy
F-938 00 EPINAY
Francio

Sekretario:

Yngve Nilsson
Käppland. Lagga.
S-741 00 KNIVSTA
Svedio



## T A N E F KUNVENIS EN BULONJO

Pli ĝuste: Turista Asocio "LA NATURAMIKOJ", Esperanto-Fako (TANEF) kadre de la ĉi-jara SAT-kongreso, okazinta de la 22-a ĝis 29-a de aŭgusto 1987 en Boulogne-sur-Mer (Francio) havis sian jarkunvenon. Ĝi okazis la 25-an de aŭgusto en la kongresejo en Ambleteuse.

Partoprenis ĝin 70 gekamaradoj el naŭ landoj. Prezidis la kunvenon redaktoro F.W. Poppeck. Gerard van der Horst kaj Karin Lencki kiel protokolantino. Pro personaj kaŭzoj la komitatanoj Erna Döring kaj Hanspeter Senn ne povis partopreni. K-do Poppeck transdonis de ili salutojn al la kunveno.

Per enkonduka parolado k-do Poppeck skizis la taskojn kaj agadojn de la Naturamika Movado kaj la rolon de ties Esperanto-Fako (TANEF). La jarraporton de nia fakreferantino Erna Döring laŭtlegis K-do G.v.d. Horst. En ĝi k-dino Erna Döring menciis la plej gravajn aktivecojn en la diversaj landaj asocioj kaj de TANEF mem. Nepre necesas, ke ni havu oficialajn fakreferantojn kaj perantojn en pli multe da landoj. Bonvolemaj gekamaradoj anoncu sin.

Kamarado Poppeck en sia raporto atentigis pri la rolo de nia revuo kiel ligilo inter la Naturamikaj esperantistoj kaj kiel informilo por gesamideanoj interesitaj pri naturaj kaj turismaj belaĵoj, ekologiaj problemoj kaj naturprojektaj aferoj. ......

Cetere kamarado Poppeck atentigis, ke li estas preta labori kiel redaktoro ne plu pli longe ol ĝis la jaro 1989.

--Jen, mallongigita raporto de k-do Poppeck.-

## ****** T A N E F EN 1988 FERIOS EN BURGBERG ******

En Bulonjo estis sugestite, organizi la venontjaran TANEF-kunvenon denove kadre de internacia feriosemajno.

Kamarado Hermann Schmid (Aŭgsburgo), TANEF-fakgrupestro en F.R.Germanio, tre rapide kaj celkonscie agis. Ĝi okazos de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1988 en la bela ferioloko BURGBERG apud Sonthofen. Aliĝilon petu de Hermann Schmid, Alte Reichsstr. 31 f, D-8902 NEUSÄSS.

# DEKLARO

Estas tradicia uzado de la Kongresoj de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA ke ĝi fine de siaj kamaradecaj manifestacioj ellaboras deklaron pere de kiu la kongresanaro akuzas, atakas aŭ eĉ laŭdas la politikajn, kulturajn, sociajn, ekonomiajn cirkonstancojn tutmondajn.

Sed evidentiĝas, ke la laste fiksita Deklaro, aprobita de la 60-a Kongreso de S.A.T. en Bulonjo estas signita de eksterordinara aktualeco en la pritraktado de la nuntempa situacio kiu troviĝas en rapide aliformiĝanta stato.

Pro tio la Deklaro tekstas jene:

L A K O N G R E S O

fieras, ke 100 jarojn post la apero de la Unua Lernolibro de D-ro Zamenhof, la Internacia Lingvo Esperanto plene realigis sian ĉefan taskon, nome plifaciligi la komunikadon inter diversgentaj homoj;

fieras, ke Esperanto ŝuldas sian disvastiĝon nek al militistaj ekspedicioj, nek al la vendo de armiloj, nek al la subpremadoj, nek al la neniigo de aliaj lingvoj;

konstatas, ke por la Laborista Esperanto-Movado, la Internacia Lingvo estas forte ligita kunstrebado al paco kaj socia justeco, kej ke S.A.T. ne plu konservas sian pensliberecon rilate al politikaj sistemoj kaj reĝimoj; tiun fakton substrekas la okazigo de la SAT-kongreso en Bulonjo ĉe maro, kaj ne en Pollando pro nuligo de invito;

konstatas, ke en la Internacia Jaro de Senhejmuloj la rajto havi propran indan hejmon, samkiel la rajto je laboro, por granda parto de la monda loĝantaro estas ne efektivigitaj kaj konscie neglektataj de diversaj reĝimoj;

alvokas kontraŭbatali la ĝeneralan tendencon al akra disdivido de la socio inter gelaboristoj unuflanke, kaj senlaboruloj kaj etpensiuloj aliflanke, kio rekte koncernas socikulturajn asociojn kia S.A.T.;

konsideras la nunan evoluon en Sovetio kiel pozitivan, kaj esperas, ke el tio rezultos pli da personaj kaj grupaj kontaktoj, kiuj povas kontribui al faligo de ambaŭflankaj antaŭjuĝoj; la Kongreso substrekas la specifan potenciale grandan rolon de Esperanto en tio;

ĝojas, ke ŝajne ne plu estas obstakloj al la forigo de ĉiuj mezdistancaj nukleaj raketoj el la mondo, kaj ....

daŭr. p. 9



akcentas, ke la publika opinio, ĉu nacia, ĉu internacia, havis gravan influon en tiu ĉi decido; tio estu instigo al plua agado;

deklaras sian solidarecon kun la Nikaragva popolo trafita de milito, kies kontraŭrevoluciaj fortoj estas subtenataj de la Usona registaro kaj de mondaj kapitalistoj;

substrekas, ke la socia karaktero de la nunaj mondskalaj problemoj de la medio postulas ne nur teknikajn solvojn, sed ankaŭ ŝanĝiĝon en la sinteno de la homoj, kiuj ne plu estu mastroj de la naturo, sed sentu sin integra parto de ĝi.

**************************************************


## I N V I T O A L B R A Z I L I O

K-do Ledon, kiu organizas la 61-an kongreson de S.A.T. invitas nin ĉiujn al Brazilio. La unua SAT-kongreso de la dua jarcento okazos ekster Eŭropo, en la nova mondo, en Campos do Jordão.

Jen, informo kaj instigo por partopreni al la 61-a

### 61-A Kongreso de SAT
### 06.08 - 13.08.1988
### Campos do Jordão - Brazilio

Kongresejo kaj loĝejo kun kompleta pensiono Parque Hotel - Campos do Jordão - Brazilio.



*Jen bela kolora kongresa poŝtkarto, mendebla ĉe SAT.*
*Prezo: 2 FF ekzemplero + afranko.*
*Folio de 9 glumarkoj: 3 FF.*

ORGANIZA KONGRES - KOMITATO - OKK
Gilbert R. Ledon - Symilde S. Ledon - Lília L. da Silva - Krešimir Barkovič - Gersi A. Bays.

**Ĝenerala adreso:**
Rua Maria Aparecida Anacleto, 111
Telefono: (011) 520 0490 - 520 9960
04809 - São Paulo - SP - Brazilio.

**Bone Atentu**
La aliĝilo estos traktata kaj valida nur post la ricevo de la pago aŭ post pag-kombino kun OKK

Kiel Pagi?
Ekster - Brazilio:
**Kasisto:** K. Barkovič - 67 Avenue Gambetta - 75020 - Paris Francio - Poŝt-Konto nº 4.313.89 G, Paris.
En Brazilio:
**Kasisto:** Lília L. da Silva ĉe OKK - Per Bankĉeko en kruzadoj laŭ la valuto de OTN.

**Kongreskotizoj - sen gastado (en Francaj Frankoj)**

| | ĝis 31-12-87 | ĝis 31-03-88 | ĝis lim-dato 30-06-88 |
|---|---|---|---|
| SAT-membro | 235 | 300 | 350 |
| SAT-geedzoj | 375 | 450 | 525 |
| SAT-gejunuloj 15-28 jaraj | 120 | 150 | 180 |
| Gasto | 295 | 350 | 410 |
| Gastogeedzoj | 470 | 530 | 575 |
| Gastogejunuloj 15-28 jaraj | 155 | 210 | 265 |

Subtenanto (laŭvole; kiu pagos almenaŭ 100 FF, tiu ricevos la kongres-dokumentojn). En Brazilio la aliĝantoj bonvolu uzi la ŝanĝon pere de OTN (Obligacioj de la Trezoro Nacia) Bazo: 1 OTN = 50 FF aŭ konsulti OKK-on.

Kun granda bedaŭro ni devas informi vin, ke nia kamarado

NORBERT BARTHELMESS

nin por ĉiam forlasis lundon, la 30-an de Novembro 1987

Laŭ lia deziro, nenia ceremonio okazu, nek entombiga — nek bruliga. Jam delonge li decidis donaci sian korpon al la Medicina Fakultato, kaj entreprenis ĉiujn klopodojn tiu-rilatajn.

Kun li forpasis unu el tiuj homoj, dank' al kiuj SAT akiris sian prestiĝon.



La fotografaĵo montras la ageman k-don Barthelmess en la rondo de esperanto-pioniroj (inter ili kelkaj SAT- kaj LEA-anoj) organizante kongreson de Rejnlando - Vestfalio la 13-an - 15-a de septembro 1947 en Krefeld.

Norbert Barthelmess naskiĝis la 19-an de februaro 1897 en Düsseldorf. Li ĉiam interesiĝis pri literaturo kaj lingvoj. Li ekkomencis lerni Esperanton en la jaro 1910 kaj en la sekvanta jaro li trovis kontakton kun la Laborista Grupo esperantista en Düsseldorf. Post la unua Mondmilito Norbert konatiĝis kun SAT kaj Lanti.

La SAT-mentoro proponis al B. transpreni la redaktan taskon por SENNACIULO kaj SENNACIECA REVUO. (1923) Post postmilita interrompo li daŭrigis sian aktivecon kaj 1948 estiĝis sekretario de SAT.

Ni perdis pli ol nur veran amikon! AFS





# INFORMOJ EL ESPERANTIO

La 72-a Kongreso de la UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA), okazinta la la 25-an de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en la ĉefurbo de Pollando-VARSOVIO- sendube meritas la superlativojn: "La plej impona Kongreso de UEA", "La kulmino de la Jubilea jaro 1987". Tian opinion al ni esprimiĝis nia LEA-kamarado Oskar Schulz, kiu troviĝis inter la aro de 5.943 kongresanoj el 60 landoj. Ĝoje impresita estas k-do Schulz ankaŭ pro la amaso da ĉ. 200 programeroj kun 680 artistoj, filmoj, koncertoj, teatraĵoj, ekspozicioj kaj fakaj kunvenoj.

Rezume povas esti dirita, ke la tutmonda esperantistaro havas motivon esti fiera pro la inda mondskala omaĝo al la Internacia Lingvo Esperanto, kaj al la kritikemaj neesperantistoj tiu demonstracio de la komuna lingvo esperenble efiku kiel signalo, ke Esperanto vivadis, nun vivadas, kaj estonte vivados!

La 73-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos la 23-an ĝis la 30-an de julio 1988 en Roterdamo

Interesitoj petu informojn kaj aliĝilojn ĉe:
s-ro Richard Hirsch (ĝen.sekr. de GEA)
Lambertstraße 12, 6430 Bad Hersfeld.

LA 66-a GERMANA ESPERANTO-KONGRESO 1988 en DUISBURG

Dum GEA-estrarkunsido fine de oktobro 1987 la estraro fiksis la lokon kaj tempon por la venontjara 66-a Germana Esperanto-Kongreso. Ĝi okazos pentekoste 1988 (20-a ĝis 23-a de majo) en Duisburg. La loka kongresa komitato invitas la esperantistojn, precipe en la Ruhra regiono al organiza kunhelpo. Helpemuloj anoncu sin ĉe s-ro Otto Nitsche, Kammerstr. 211, 4100 Duisburg. Tel.: 0203-359615.

ATENTIGO: Duisburg en la Ruhrregiono kiel loko de Ŝtalindustrio pro la nuntempaj ekonomiaj krizoj altiris sur sin la mondan kaj landan intereson.

**Esperanto- SAT Amikaro**

La 42-a kongreso de ĉitiu Laborista Esperanto-Asocio en franclingvaj regionoj dum ĉijara pasko havis sian lokon en la urbeto Vaison -la-Romaine, nome en la rimarkinda kultura centro kiu nomiĝas "A Coeur Joie".

El multkolora programo por ni plej interesa estas la renkontiĝo de "LABORGRUPO PRI MANIEROJ PROPAGANDI" pri kiu raportis k-do Yves Peyraut.

Laŭ la raporto 30-kelke da gekamaradoj partoprenis en la kunsido, kies temo estas la jena: "Ebloj,sukcesaj aŭ ne, propagandi en sindikatoj, organizoj, politikaj partioj". Dum du horoj la diskuto estis tre vigla, kaj mi provis rezumi ĝin ĉi-sube. La proponoj estis diversaj, kaj kelkfoje la opinioj neatentitaj..............

Por mi kiel redaktanto de LEA/G-Informilo ŝajnas esti inter la diverspritraktitaj varb- kaj propagandebleco kiel la plej grava la retrospektiva ideo pri "Organizado de konkreta solidareco" pro la jena vidpunkto: -Oni kreu la Gazetan Servon de S.A.T.. Ni ĉerpu el broŝuro "Sur du frontoj".

Ekzemple la Gazeta Servo, fondita en la jaro 1927 kaj estrata de OTTO BÄSSLER el Lejpcigo, peradis al nacilingvaj laboristaj gazetoj multajn valorajn informojn pri la batalo kaj vivo de la laboristaro en diversaj landoj. Dum unu sola jaro, la Servo akiris 115 kunlaborantojn en 33 landoj. Ili transdonis al redaktistaroj de la laborista gazetaro 310 dokumentojn. La materialo aperis sub la formo de 1466 raportoj. Kial ne denove uzi la malnovajn ideojn?? Jam Francois Degoul (Francio) kaj John Spencer (Britio)komencis; ni daŭrigu la aferon.

LA 43-a KONGRESO DE SAT-AMIKARO estiĝos en urbo A l b i (departemento Tarn) la 2-an, 3-an, 4-an kaj 5-an de aprilo 1988.
La Kongreso disvolviĝos en lernejo Ecole Normale Mixte (rue de l'Ecole Normale, 81000 Albi).
O.K.K.: Prezidanto: Robert Arnaudet (40, rue Ingres , 81000 Albi. Sekretariino: Ginette Costes,( Rieucourt, Terssac, 81150 Marssac sur Tarn.
Kasisto: Jean Costes, (sama adreso), poŝta konto n-ro 4420 21 Z Toulouse.

---



# Workers Esperanto Movement (SATEB)

29 FARRANCE ROAD
CHADWELL HEATH, ESSEX
RM6 6EB, ENGLAND

La brita LEA invitas al sia JARKONFERENCO kiu okazos Vendredon, la 25-an, sabaton la 26-an, dimanĉon la 27-an de marto 1988 en The Hayes Conference Centre, Swanwick, Derbyshire.
Dum la konferenco okazos: SATEB-laborkunsidoj, SAT-kunveno, Politika Forumo kaj du prelegoj kun filmoj pri la jenaj temoj: "Brulaĵo el forĵetaĵoj"
"Akvomastrumado kaj la medio"

*****************************************************

ESPERANTO ★

IFEF · FISAIC
40a Internacia Fervojista Esperanto - Kongreso
PERPIGNAN
4a-11a de junio 1988


40A IFEF-KONGRESO
PERPIGNAN - FRANCIO
4.-11. JUNIO 1988

Adreso: 40a IFEF-kongreso,
1bis, Rue d'Athènes
F-75009 PARIS
Poŝta konto: 52 14 35 H PARIS

IF EF

*****************************************************

**HOMO KAJ SCIENC-TEKNIKA REVOLUCIO**



ELKORAN INVITON al la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo!!!

IFER 1988

Tiu ĉi renoma renkontiĝo posedas ligon al la leipzigaj printempaj foiroj. Por IFER-gastoj eblas uzi la ofertojn de tiu ci mondfama internacia foiro. Laŭ propra organizado la IFER-anoj povas ĉeesti eĉ la tutan printempan foiron (kiu 1988 okazos de la 13-a ĝis la 19-a de marto) kaj kunesti tagojn en vere internacia etoso kun diversnaciaj vizitantoj de IFER'88, kiu okazos en la tempo de la 11-a ĝis la 13-a de marto 1988 en Leipzig (DDR)

Kontaktadreso: KULTURBUND DER DDR (Kulturligo de GDR)
Organiza Komitato de "IFER '88"
Käthe-Kollwitz-Strasse 115
L e i p z i g DDR - 7010

RIMARKO: La nombro de partoprenantaro estas limigita!





GDR - Rostock, en decembro 1987

Estimataj gesamideanoj, karaj geamikoj !

Bonvolu akcepti de ni la plej bonajn dezirojn por la festotagoj kaj la alproksimiĝanta

"N O V A J A R O 1 9 8 8"

Ni esperas, ke la sekvonta jaro alportu al vi nur sanon, sukceson en via E-gado kaj P A C O N por ni ĉiuj !

Amike la esperantistaro de Rostock.

FESTOTAGAJN
NOVJARAJN
BONDEZIROJN
la Libera Esperanto-Asocio povis danke akcepti de la Esperantogrupoj en la Sovetio kaj Rostock (GDR).

NI KAMARADECE RECIPROKAS !!!

*******************************************************

## 4a PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA

Germana Esperanto-Asocio invitas precipe familiojn al la 4-a Printempa Semajno Internacia, kiu okazos de la 29-a de marto ĝis la 5-a de aprilo 1988 en la montara Eifel, sude de Aachen kaj Köln kaj tute proksime al Nederlando, Belgio kaj Francio.

Interesitoj petu tre baldaŭ aliĝilon kun pliaj informoj de Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde, Tel.: 02573/626

*******************************************************

E S P E R A N T O - S O C I E T O D Ü S S E L D O R F
Carmenstr. 5 - 4000 Düsseldorf 11, ĉiun jaŭdon post la 20-a de la monato renkontiĝas en la Restoracio SYMPOSIO troviĝante „Ostseite Hbf." gastoj ĉiam bonvenaj!!

*******************************************************

K-do E.Weichmann, kiu vizitis la 60-an Kongreson de SAT kaj ĉioktobre vojaĝis al Sovetio, invitas al la jenaj prelegoj, kiuj okaziĝos en la RWAG, Dortmund, Steinstr. 48, proksime de la norda elirejo de stacidomo

11. Januar 1988 — 19.00 Uhr —
Eduard Weichmann
Nördliches Frankreich
— Diavortrag —

14. März 1988 — 19.00 Uhr
Eduard Weichmann
Flug Moskau — Rostov/Don — Moskau
— Diavortrag —

---

# LIBERA ESPERANTO-ASOCIO EN GERMANLINGVIO

| | |
|---|---|
| **Kassenstelle:** | **Postgirokonto:** |
| Margot Weichmann | Dortmund Nr. 129128-467 |
| Lotenkamp 4 | |
| 4600 Dortmund 14 | Tel.Nr. 0231-89777 |

# ALIĜILO

Ich erkläre hiermit meinen Beitritt: ☐
Mi deklaras per tio mian aliĝon

Ich möchte das Organ "LEA/G-INFORMILO abonnieren: ☐
Mi deziras aboni la asocian organon

Familienname:
Familia nomo: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Vorname :
Antaŭnomo : . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Strasse: . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .
Strato :

Stadt : _ _ _ _ . . . . . . . . . . . . . . . .
Urbo :

Geburtsdatum: . . . . . . . . Beruf : . . . . . . . .
Naskiĝtago : Profesio:

Ich habe folgende Bemerkungen: . . . . . . . . . . . . .

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Datum und Unterschrift: . . . . . . . . . . . . . . . . .
Dato kaj subskribo :

(Bitte in Druckschrift schreiben und an die Kassenstelle senden! )